

Kurtaj ondoj

Claude Gacond, 389-a radioprelego, 1971.03.24 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni bonvenigis la iniciaton de gesinjoroj Iva kaj Lennart Aberg en Gotenburgo, Svedio, kiuj fondis Societon por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio. Kaj ni legis erojn el la dua numero de la *Bulteno Inter*, kiun redaktis sinjorino Iva Aberg.

A.- En la legado, kiun ni devis interrompi, ni komencis citadi artikolon dediĉitan al la temo : « *Kiel disvastiĝas la radio-ondoj ?* » Ni vidis, ke la laŭteraj ondoj havas limigitan etendon, dum la spacaj ondoj, se ili estas mallongaj aŭ kurtaj, estas respegulitaj al la tero, kiam ili atingas tavolojn de jonizita gaso, kiu ĉirkaŭas la teron je iu alteco.

Cl.- Laŭ la pozicio de la ricevilo rilate al sendilo oni povas bone aŭ malbone kapti la respegulitajn kurtondojn. Pro tio la sendiloj samtempe dissendas per pluraj diversaj frekvencoj. Ĉiam unu el tiuj frekvencoj pli bone sukcesas, ol la ceteraj, tio laŭ la distanco inter la ricevilo kaj sendilo, kaj ankaŭ laŭ la horo en la tago kaj la sezono.

A.- Pro la fakto, ke la jonizitaj tavoloj kaj la tersurfaco reflektas la radio-ondojn, ĉefe la kurtondojn, tiuj kurtondoj povas salti tien kaj reen inter la koncerna spaca tavolo kaj la tero plurfoje. Tiel ili atingas multajn regionojn sur la tero. Ekzemple oni kalkulas tri similajn saltojn inter Eŭropo kaj Usono.

Cl.- Oni ĝenerale parolas pri kvar diversaj tavoloj en la spaco. Ili estas troveblaj en diversaj distancoj de la tersurfaco. La plej proksima al la tero estas la D-tavolo, proksimume alta je 80 – 100 kilometroj. Ĝi estiĝas dum la luma sezono kaj reflektas longajn ondojn.

A.- Pli supre, je 120 – 150 kilometroj, oni tage trovas la E-tavolon, kiu eĉ povas resti surloke kelkajn horojn post la suna malleviĝo. Ankaŭ okazas pli malpli regule reflektado de la E-tavolo dum la nokto.

Cl.- Plej grava por la longdistancaj radio-dissendadoj per kurtondoj estas la F-tavolo, kiu preskaŭ komplete ĉirkaŭas la teron. Nokte ĝi situas je 270 – 290 kilometroj super la tero. Tage ĝi dividiĝas je du apartaj tavoloj, nomataj F1-tavolo je 230 -260 kilometroj kaj F2-tavolo je 290 – 310 kilometroj de alteco.

A.- Tie ĉesas la klarigoj en tiu *Bulteno Inter*. Ni aldonu tiun klarigon. Je la suna malleviĝo aŭ suna leviĝo, kiam la jonizitaj tavoloj moviĝas, tiam la kurtondoj malfacile revenas al la tero. Ili ne ĉiam estas respegulataj. Kelkfoje ili por ĉiam forlasas la teron. Pro tio la aŭdado de kurtondaj programoj estas malfavora je iuj horoj.

Cl.- Inter niaj geaŭdantoj troviĝas pluraj tipoj da personoj. Kelkaj geaŭdantoj provas la kaptadon de nia programo. Ili provas diversajn ond-longecojn kaj rimarkas, ke unu el ili estas pli favora, ol la aliaj. De tiam ili ĉiam restas fidelaj al tiu longeco. Fakte tio povas funkcii nur por iu periodo. Kun la ŝanĝo de sezono la jonizita tavolo situas je alia alteco. Aŭtomate tio influas la vojaĝon de la ondoj. Tiam tiuj geaŭdantoj plendas, ke ili ne plu povas kapti nin. Ili provu per aliaj long-ondecoj.

A.- Kelkaj geaŭdantoj, post diversaj provoj, konscias, ke mankas io al ilia aparato : anteno. Tiam ili iras en radio-magazenon kaj informiĝas pri la kurtondaj antenoj. Estas longaj fadenoj metalaj, kiujn oni fiksas ĉirkaŭ la ĉambro. Ili favoras pli fortan kaptadon. Estas ĉiam bedaŭrinde posedi bonan ricevilon, se mankas al ĝi la responda kurtonda anteno.

Cl.- Se vi havas malfacilaĵojn por kapti niajn programojn, vizitu do foje radio-magazenon, diru ke vi deziras aŭskulti esperanto-programon, indiku la ond-longecojn kaj informiĝu pri la

Kurtaj ondoj
Claude Gacond, 389-a radioprelego, 1971.03.24 & 27

plej taŭgaj antenoj. Tute certe la radio-vendisto tute afable konsilos vin, kaj vi konstatos, ke la necesa materialo ne estas multekosta.

A.- Estas geaŭdantoj, kiuj nin aŭskultas per simplaj porteblaj aparatoj. Ili miras, kiel facile ili povas nin aŭdi. Kaj vizitante amikojn, ili anoncas al ili tiun aŭdan facilecon. Ili proponas ekzemplan provon, kaj la aparato nenion plu aŭdigas. Nur bruoj eliras, kaj eble mallaŭta ŝanĝanta voĉeto. Ili ne komprenas, kio okazis, ĉar reveninte hejmen, ili ree facile kaptas la deziratan stacion.

Cl.- Simple, irante en alian lokon, ili alproksimiĝis aŭ malalproksimiĝis de la elsenda stacio. Ĉar por ĉiu ond-longeco estas favoraj ricevaj lokoj, ili ĵus forlasis unu el tiuj favoraj lokoj. En tiu alia loko ili devus provi kapti la radio-programon per alia ond-longeco. Bedaŭrinde la porteblaj aparatoj havas tre limigitan ond-larĝecon.

A.- Tiu limigita ricevpovo de la porteblaj aparatoj instigas la elsendilojn ĉefe uzi la plej favorajn ondojn. El tio naskiĝis bedaŭrinda ond-milito. Multaj esperantistoj bedaŭras la fakton, ke je iuj horoj, anstataŭ povi klare aŭdi la deziratan programon, ili aŭdas specon de program-miksaĵo, en kiu ĉiu stacio fuŝas la programojn de la ceteraj stacioj.

Cl.- En la jaroj 1923, 24 kaj 25 kelkaj esperantistoj iniciatis pli taŭgan dividon de la ondoj. Sinjoro Isbrucker kun Edmond Privat kunvokis en Ĝenevo kongreson, kiu pere de esperanto kiel labor-lingvo diskutigis multajn radio-fakulojn. El tiuj kunvenoj naskiĝis diversaj tutmondaj radio-organizaĵoj kaj iu divido de la ond-longecoj. Estus interese, ke la esperantistoj, kiuj havas intereson por la radiofonio, informiĝu pri tiuj kongresoj, retrovu la koncernajn protokolojn, kaj diskonigu la tiaman rolon de esperanto.

A.- Eble tio estas laboro por la Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio, kies sidejo estas en Gotenburgo, Svedio.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-